
ESPERANTAGRUPO KORTRIJK 1927




# La Amikoj de Saint-Omer

*ORGANO DE INICIATIVA KAJ TURISMA SINDIKATO*

*DE SAINT-OMER*

**Redaktado kaj Administrado :**

**145, Rue de Dunkerque.**

Saint-Omer (P.-de-C.) France.


## Saint-Omer

ARTA URBO

Saint Omer, nomita en la pasinta tempo « la Urbo kun cent sonorilejoj », posedas ankoraŭ hodiaŭ artan trezoron, kiu ĝin ordigas sur la unuan rangon de niaj Nord-francaj urboj.


Ĝia baziliko « nia Sinjorino » situita sur la loko de la antikva Sithiu, estas mirindaĵo de la gota arto.



La baziliko « Nia Sinjorino »

Ĝi posedas artan meblaron, kiu devenas de la antikva abatejo de Saint-Bertin ; jen neplena listo : tre rimarkinda orgentribuno, astronomia horloĝo unika en la mondo. ligna Virgulino el dekdua jarcento, grandegaj statuoj, kiuj devenas de la preĝejpordego de Thérouanne, multaj malgrandaj monumentoj bareliefe skulptitaj el ŝtono, malnovaj vitraĵoj, tomboŝtonoj, kahelaroj de la dektria jarcento, vidindaj ŝtonaj sarkofagoj el oka jarcento ; la tuto faras veran muzeon, kie troviĝas kunigitaj ĉiuj arkeologiaj trovitaĵoj de la regiono.

La turo Saint Bertin, ruino de la antikva tiel nomita abatejo estas unu el la plej vidindaj monumentoj.



Abatejo de Saint-Bertin
Ruinoj de la preĝejo : XVa jarcento

La preĝejoj Saint-Denis, Saint-Sépulcre, la antikvaj kapeloj estas veraj artaĵoj, kiuj altiras kaj logas la okulon de la vizitantoj.

Ĝiaj muzeoj estas nekontesteble la plej belaj el la provincoj Artois kaj Flandre. Unu el ili, instalita en la malnova hotelo Colbert, enhavas mirindan kolekton de niaj plej famaj majstroj, ŝulditan grandaparte al la malavareco de la Baronino du **Teil Chaix d'Est-Ange.** Estas videblaj, inter multaj aliaj : pentraĵoj de Gérard David, Keyser, Leroux, Boilly, Prudhon Vincent, Blarenberghe, Duplessis, Lépicié, Greuze, Joets (Pluraj el tiuj pentraĵoj estas montritaj en la Arta Franca Ekspozicio en Londono) ; lanbrodaĵoj de Boucher, mebloj de Baudin, senkompara kolekto



Improviza Koncerto, de L.-L. Boilly

de armiloj, kunmetita el kirasoj, spadoj, kaskoj, ponardoj de la dekdua ĝis la dekoka jarcento, argilaĵoj, ceramikoj, medaloj, moneroj el la plej malproksimaj epokoj de nia historio.



La Leviĝo de Fanchon, de N.-B. Lépicié

La muzeo Henri Dupuis, kiun donacis tiel nomita loĝanto de Saint-Omer al sia naskiĝurbo, enhavas krom mebloj, pentraĵoj, malnovaj fajencoj de nekalkulebla riĉeco kaj varieco, rimarkindan kolekton de pli ol tridek sepmil konkoj.


Saint-Omer posedas ankaŭ bibliotekon kun pli ol cent mil volumoj, pluraj centoj da inkunabloj kun riĉaj kolorigaĵoj de la oka ĝis la dekkvara jarcento, kiujn plezure esploras la kleraj libramantoj de la tuta mondo kaj kiu permesas sekvi paŝon post paŝo la evoluon de la miniaturo tra ĉiuj epokoj.

Se vi aldonas la viziton de la preĝejoj en Blendecques, Esquerdes, Bayenghem-les-Seninghem, Rumingben kaj precipe Tournehem kun ĝiaj plej rimarkindaj riĉaĵoj arkeologiaj, vi konfesos, ke Saint-Omer estas neelĉerpebla fonto por ĉiuj amantoj de la belo kaj laborantoj por estonto.

# Saint-Omer

« NORDA - VENEZIO »

Ĉirkaŭbarita ĉiuflanke de la rivero Aa, ĉirkaŭita de la multegaj kanaletoj, la multaj riveroj, kanaloj, lagetoj kaj marĉoj, kiuj nomigis ĝin la franca Bruges, ĝi vere estas Norda Venezio, kie ĉiudimanĉe la promenantoj alkuras por viziti ĝiajn pentrindajn pejzaĝojn kaj ĝui ilian tiel interesegan ĉarmon. En tiu iama golfo de la Norda Maro, longa



« Norda-Venezio »


je dekdu kilometroj, hodiaŭ plena je duoninsuloj, insuletoj vivas laborema popolo de legomkulturistoj. La marĉo estas ilia bienaro, el kiu ili malofte eliras.

Lertmovaj kaj viglaj, la barketoj glitas laŭlonge la rivero, por transveturi la ĝardenistojn ĝis ilia laborloko ; ili entenas la ilojn, la korbojn, kelkfoje plugilon kaj samtempe ĉevalon aŭ azenon. Aliaj rekondukas la laboristojn kaj estas plenaj je faskoj de karotoj bone ordigitaj, de artiŝokoj aŭ de amaso de florbrasikoj ; tiu regiono estas efektive la legomĝardeno de Norda Francujo. Ĝia produktemeco estas ŝuldita al ĝia grundo el torfo kaj ŝlimo, kiu iafoje korodita de la fluoj, disiĝas el la fundo kaj flosas tra la akvo kun siaj domoj kaj kampoj : ili estas la « flosantaj insuloj » de Clairmarais kun siaj feinoj, siaj legendoj kaj siaj koriganoj.

## Saint-Omer

INDUSTRIA CENTRO

Multnombraj estas la ekskursoj farindaj ĉirkaŭ Saint-Omer : la arbaro de Clairmarais kun la ruinoj de la antikva abatejo, Arques kun la ŝiplevilego de Fontinettes, la valo de Aa kun siaj kasteloj kaj uzinoj.



Ŝiplevilego de Fontinettes

La tendaro de Helfaut kun sia grandega higienejo, Wisques kun siaj monakejoj, Quercamps, Guémy, Tournehem kun siaj kasteloj, ruinoj, arbaroj, Ardres kun la Sensimila Ponto kaj la tendaro de Ora Drapo, Watten, Saint-Momelin, Cassel kun sia historia muzeo, siaj hoteloj, siaj distriktejoj, sia Armilplaco kaj sia supera ĝardeno, en kiu troviĝas la memorkolono de ĝiaj sieĝoj kaj la statuo de Marŝalo Foch, inaŭgurata la 7an de Junio 1928 de la Prezidanto Poincaré.

## Saint-Omer

RENDEVUO DE ĈASADO KAJ FIŜKAPTADO.

Saint-Omer, arta urba, Saint-Omer Norda Venezio, Saint-Omer centro de turismo, estas samtempe rendevuo de ĉasado kaj fiŝkaptado.

Ĉasado en arbaro, en kamparo, en marĉo, ĉiuj konkure ĉasbestoriĉaj, ĝuegigas la Nordanojn ; multegaj, forlasante la prizorgojn de la negoco, aivenas tien por praktiki sian preferatan sporton.

La fiŝkaptado ankaŭ havas siajn adeptojn. Riveroj, kanaletoj, lagetoj estas ĉiutage trairataj de miloj da fiŝkaptistoj venantaj el ciuj partoj de la regiono. La arbaro de Clairmarais, iam posedaĵo de la monakoj de Saint-Bertin, enhavas grandajn lagojn kiuj, forlasataj de post la Franca Revolucio ĝis la lastaj jaroj, estis nur vasta kampo de kanoj,



Vidaĵo en la Norda Venezio

tra kiuj serpentumis, dum pluva vetero, maldika rivereto. La administrado de Akvoj kaj Arbaroj, juĝante pri ilia graveco, ĵus ilin purigis, starigis barilojn, akvujojn, kaj tiel kreis novan kaj interesan fonton de gajnoj, kiuj donos pli grandan valoron al la belega arbaro de Clairmarais ; al la altiro de la ĉasado estos aldonata la ĝuo de la fiŝkaptado en mirinda pejzaĝo.

## Saint-Omer

CENTRO DE TRAAERA TURISMO

Saint-Omer, kiun ni tre konsilas al vi viziti, estas ne nur centro de turismo sed samtempe centro de traaera turismo.

Baldaŭ, ĝia altebenaĵo de Bruyères, kiu havas areon da okdek hektaroj, fariĝos Aerhaveno.


La laboroj komenciĝis, la inaŭguro okazos baldaŭ. Situita en agrabla kaj vasta kadro, ĉirkaŭita de belegaj bienoj, la areo de alteriĝo enhavos plie ludejon, tenison, golfon, pololudon, glitejon kaj kazinon konstruitan kun terasoj, kie ĉiu povos trovi samajn distraĵojn, kiel en la banurboj kaj kuracejoj.



Aviadejo.

Mi haltas, ĉar mi ne povus pentri al vi per kelkaj linioj, la tutan riĉecon arkeologian kaj artan de nia regiono, diri al vi ĝian grandiozan ĉarmon kaj la nedifekteblajn belaĵojn, nek tutnombri la multajn distraĵojn.

Venu do multaj al ni por instruiĝi, ripozi, promeni, amuziĝi. Vi estos akceptataj laŭ la malnova franca kutimo kaj vi fariĝos tiel viavice niaj plej bonaj agentoj de propagando.



La « Granda Dio » de Thérouanne
(XVa jarcento)

# Komerca kaj industria Foiro

Komerca kaj industria Foiro estos organizata en Saint-Omer de la 12a ĝis 20a de Aŭgusto.

La 13an kaj 14an okazos la inaŭguro de la Aviadejo de Bruyères. La 15an de Aŭgusto, ĉiujara festo de la kvartalo de Mathurin (giganto de la urbo).

Tiuj festoj estas prezidotaj de la plej gravaj personoj oficialaj de Francujo. Ili donos specialan altiron al nia urbo, kaj permesos organizi tutkoran akcepton por niaj fremdaj amikoj, kiuj bonvolos nin viziti je tiu okazo.

**E. DUFLOS,**
Prezidanto de la Sindikato.

# La Grupo Esperantista
## de Saint-Omer

La Grupo Esperantista datumas de 1902. Tuj post sia naskiĝo, ĝi kreis kursojn en la urbo kaj en la liceo.

Dufoje ĝi organizis la Federaciajn Kongresojn de Norda Francujo en 1912 kaj 1927.

En Saint-Omer, ekzistas ĉe la Prezidanto unu el la plej riĉaj kolektoj de Esperantaĵoj de tuta Francujo :

Pli ol 1200 libroj kaj broŝuroj, de 1887 ĝis nun ;

Pluraj centoj da malsamaj ĵurnaloj kaj revuoj ;

Sama nombro da gvidlibroj, gvidfolioj k. t. p. ;

Poŝtkartoj el pli ol 80 malsamaj landoj ;

Fotografaĵoj el multaj kongresoj universalaj, naciaj, regionaj.

Sed la plej valora parto de la kolekto konsistas el :

La unua lernolibro por Francoj, eldonita de Zamenhof en 1887, sub la pseudonimo de D^ro^ Esperanto ;

Specimeno de la arĝenta spesmilo de S^ro^ de Saussure ;

Unu el la oficialaj standardoj de la unua Universala Kongreso de Boulogne-s/-Mer en 1905 ;

Aŭtografoj de Zamenhof kaj de ĉiuj liaj samfamilianoj.

Dank al tiuj riĉaĵoj oni povis organizi plurajn ekspoziciojn esperantistajn, kiuj havis kreskantan sukceson :

En Saint-Omer dum la jaroj 1903, 1912, 1925 ;

En Boulogne-s/Mer dum 1931.

La Grupo de Saint-Omer akceptos tutkore la samideanojn, kiuj trapasos la urbon ; ili bonvolu antaŭe skribi al la Prezidanto :

**E. DELIGNY,**
Delegito de U. E. A., 4, rue Allent

La Samideanoj, kiuj ricevos tiun gvidfolion, estas petataj sendi al mi kelkajn dankajn vortojn, por ke mi povu montri al nia urba Sindikato la taŭgecon de Esperanto por la disvastigado de ĉiuspecaj informoj en la tutan mondon.

Imp. L. Loïez, Saint-Omer

*Le Gérant :* L. LOIEZ.